Heinrich Heine,

# Lorelej

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial subita
malgaj' en la koro naskiĝis;
el tempo jam enterigita
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,
la Rejno mallaŭte babilas,
per oro de l'sun' en vespero
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:
en ora ornamo brilante,
sur supro de l' monto ŝi sidas,
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas
kaj kantas tra l' pura aero,
kaj forto mirinda sin trovas
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

Ŝipet' iras sur la rivero,
ŝipisto ektremis de l' kanto,
kaj blinda por ĉiu danĝero
rigardas li al la kantanto.

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela
perdiĝis sub l' akvoturnado;
ĝin Lorelej' faris kruela,
per sia mirinda kantado.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)*

*Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo* http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html.

Heinrich Heine,

# Lorelay

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Min kaptas malgaj' en la koro,
pro kio tia trist'?
Fabel' el antikva foro
ne lasas de mi kun persist'.

Aere fridetas, trankvilas,
malhelas jam la Rejn'.
La monto surpinte brilas
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,
jen supre por ador';
la ora ornamo ridas;
ŝi kombas harojn el or'.

Ŝi kombas per ora kombilo
kaj kantas kun pasi';
mirigas min la elbrilo
kaj forto de l' melodi'.

Ŝipisto ŝipeton gvidas,
lin kaptas ve' de ekzalt'.
Li ja la rifojn ne vidas',
li vidas nur supren sen halt'.

Mi kredas, ke ondoj tiras
la ŝipon funden de l' Rejn';
kaj tio de l' kant' eliras
de Lorelaj-siren'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* HANS-GEORG KAISER *(Cezar, ∗1954-05-21).*

*Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)*